# LIBRO DE OBADJA

1 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, pri Edom:
Diron ni aŭdis de la Eternulo, kaj kuriero estas
sendita al la nacioj: Leviĝu, ni iru milite kontraŭ
lin. 2 Vidu, Mi faris vin malgranda inter la
nacioj; vi estas tre malestimata. 3 La fiereco de
via koro delogis vin; loĝante en la fendegoj de
rokoj, sur via alta sidejo, vi diras en via koro:
Kiu depuŝos min sur la teron? 4 Sed se vi eĉ
leviĝus tiel alte, kiel aglo, aŭ se vi aranĝus vian
neston inter la steloj, eĉ de tie Mi ĵetos vin
malsupren, diras la Eternulo. 5 Ĉu ŝtelistoj venis
al vi, aŭ noktaj rabistoj? kiamaniere vi estas tiel
ruinigita? ili ŝtelus nur tiom, kiom sufiĉus por
ili. Se vinberkolektantoj venus al vi, ili restigus
ja forgesitajn berojn. 6 Kiel forte Esav estas
priserĉita kaj liaj kaŝejoj estas traesploritaj! 7 Al
la limo vin puŝis ĉiuj viaj interliganoj, trompis
kaj perfortis vin viaj amikoj; la manĝantoj de
via pano metis sub vin kaptilon, kiun vi eĉ ne
rimarkis. 8 En tiu tempo, diras la Eternulo, Mi
pereigos ja la saĝulojn ĉe Edom kaj la prudenton
sur la monto de Esav. 9 Ektimos viaj kuraĝuloj,
ho Teman, por ke ĉiuj sur la monto de Esav
estu ekstermitaj per mortigo. 10 Pro tio, ke vi
premis vian fraton Jakob, kovros vin honto, kaj
vi estos ekstermita por ĉiam. 11 En la tempo,
kiam vi staris apude, kiam fremduloj kondukis
lian militistaron en kaptitecon kaj aligentuloj

eniris en liajn pordegojn kaj lotis pri Jerusalem,
vi ankaŭ estis kiel unu el ili. 12 Vi devus ne
rigardi la malfeliĉan tagon de via frato, la tagon
de lia forpuŝiteco, kaj vi devus ne ĝoji pri la
idoj de Jehuda en la tago de ilia pereo, nek
fanfaroni en la tago de ilia mizero. 13 Vi devus
ne eniri en la pordegon de Mia popolo en la
tago de ilia malfeliĉo, vi devus ne rigardi ilian
suferadon en la tago de ilia malfeliĉo, nek tuŝi
ilian havaĵon en la tago de ilia malfeliĉo. 14 Vi
devus ne stari ĉe la vojdisiĝo, por ekstermi iliajn
forsaviĝintojn, nek transdoni iliajn restintojn en
la tago de malfeliĉo. 15 Ĉar proksima estas la
tago de la Eternulo kontraŭ ĉiuj nacioj. Kiel vi
agis, tiel oni agos kun vi; kion vi meritas, tio
venos sur vian kapon. 16 Ĉar kiel vi trinkis sur
Mia sankta monto, tiel trinkos ĉiam ĉiuj nacioj;
ili trinkos, trinkos ĝisfunde, ĝis ili fariĝos kiel
tute ne ekzistintaj. 17 Sed sur la monto Cion estos
saviĝo, kaj ĝi estos sankta; kaj la domo de Jakob
ekposedos tiujn, kiuj ilin posedis. 18 La domo de
Jakob estos fajro, la domo de Jozef estos flamo;
sed la domo de Esav estos pajlo, oni ekbruligos
ĝin kaj ekstermos ĝin, kaj neniu restos el la domo
de Esav; ĉar la Eternulo tion diris. 19 Kaj la
sudanoj ekposedos la monton de Esav, kaj la
loĝantoj de la malaltaĵo la Filiŝtojn; ili ekposedos
la kampojn de Efraim kaj la kampojn de Samario;
kaj Benjamen posedos Gileadon. 20 Kaj tiu multo
da forkondukitaj Izraelidoj en la lando Kanaana
ĝis Carfat kaj la forkondukitaj el Jerusalem en
Sefarad ekposedos la urbojn sudajn. 21 Kaj venos

savantoj sur la monton Cion, por juĝi la monton
de Esav. Kaj la regado apartenos al la Eternulo.

# Londona Biblio
## The Holy Bible in Esperanto (1910)

Public Domain

Language: Esperanto

2020-02-13

PDF generated using Haiola and XeLaTeX on 11 Nov 2022 from source files dated 13 Feb 2020
66d4141f-915d-52bc-b744-29459ca87515